KOMUNIKOJ
SPIRITA ELDONA SOCIETO F. V. LORENZ
Korespondadreso: Caixa Postal 3133
20001 Rio de Janeiro (RJ) - Brazilo
Nº 37 - 15/03/1985

1887-1987
Centjara Jubileo de Esperanto

KIAM MI VIDIS ZAMENHOFON

Alfred Karl Gregorius

Tio okazis antaŭ 71 jaroj. Mi havis 12 jarojn, sed mi tion memoras tre bone, kvazaŭ ĝi okazis hieraŭ.

Estis vespero de Julio 1913, en mia naskiĝurbo Koel am Rhein, en Renanio, Germanujo. Ĝi estas fama urbo, fondita de la romianoj en la jaro 9 a.K. kun la nomo Colonia Agripinenses.

Mia patrino, Auguste Emilie Burger Gregorius, estis tre bonkora kaj amema, kaj ŝi treege zorgis pri mia eduko. Ŝi orientadis min por miaj taskoj lernejaj kaj igis min plenumi tre bone ellaboritan komplementan instruprogramon. Ŝi kunportis min al koncertoj, por atentigi min pri la beleco de klasika muziko. Ŝi ankaŭ kondukis min al folkloraj festivaloj, instruante min kompreni kaj ami la ĉarmon de la popolkantoj. Ĉiudimanĉe, frumatene, ni ambaŭ foriris por longaj promenoj. Ni traitis boskojn kaj arbarojn, borde de riveroj kaj lagoj, por ke mi vidu la mirindaĵojn de la Naturo kaj tiel mi rimarku la grandecon kaj bonecon de Dio. Kreme ŝi ĉiam parolis al mi pri la amikeco, kiu devas ekzisti inter ĉiuj homoj, sen diferenco pri gento, religio aŭ politiko. Entuziasme ŝi instigis min por mia kolekto de ĉiulandaj standardoj.

En tiu neforgesebla vespero mia patrino diris al mi, ke ni iros al kunsido, kion ni ofte faris. Tiam ni iris al strato Eintracht al domo titolita ankaŭ Eintracht, kio signifas Konkordo. La salono estis plenplena. Mi ankoraŭ memoras pri tio, ke mi ekstaris, kaj miregita vidis, ke ĉiuj seĝoj havis sidantojn. Kaj antaŭ la publiko estis longa tablo, kovrita per tre blanka tuko. Mi eĉ diris al mia patrino, ke mi sentas fortan spiritan ĝojon... Ŝi ridetis, kaj ne povis respondi, ĉar en tiu momento la prelegisto komencis paroli. Estis D-ro Lazaro Ludoviko Zamenhof.

Li parolis en lingvo de mi nekonata, sed tre belsona. Lingvo, kiun mi preskaŭ sukcesis kompreni, tiel belsona ĝi estis, kvankam mi neniam estis ĝin aŭdinta. Lia parolado daŭris preskaŭ unu horon, kaj ĉiuj aŭdadis kaj rigardadis lian impresan figuron kvazaŭ ekstaze. Poste mi sciis, ke li diradis, kio estas Esperanto, nova instrumento kapabla ebligi al la homoj interkomprenon, vojo al la interkonatiĝo, kaj sekve al reciproka amo.

Dum la parolado de Zamenhof mi klopodis kompreni ion, kaj mi komprenis, ĉar li parolis tre klare. Mi pensis, ke tio okazis, ĉar mi jam frekventis la gimnazion, kaj mi lernadis la francan lingvon...

Kiam Zamenhof finis la paroladon, la ĉeestantaro ekstaris, aplaŭdante lin kun granda entuziasmo. Mia patrino tuj diris al mi:

"Ni iru, filo. Ni devas danki lin kaj premi liajn manojn."

Ni iris malrapide por atingi Zamenhofon, kiu staris apud la tablo, en vico de homoj havantaj la saman intencon... Kaj dum ni iradis, mi observadis admire tiun homon, kiu disradiis grandan bonecon.

Ni venis ĝis li por saluti lin. Kiel mi rememoras kun emocio! Du grandaj okuloj bonkore rigardis min, sed firme, tra dikaj okulvitroj. Li ĉarme ridetis al mi, kun amo, dum mia patrino prezentis min per tiuj ĉi vortoj:

"Ĉi tiu estas mia filo Alfred Karl, kun preskaŭ 13 jaroj, kiu en sia dormoĉambro - kvankam tre modesta - pendigis ĉiujn standardojn de la surteraj nacioj, faritaj kaj pentritaj de li mem..."

Zamenhof, certe esperplena pro la renkonto de estonta batalanto por la afero Esperanto, prenis miajn manojn, ilin premis, kaj kun pli penetranta rigardo, kiu atingis la intimon de mia animo, ĝin pleniganta per amo, tiamaniere, ke mi neniam povis ĝin forgesi, diris kvar vortojn, nur kvar vortojn, kiuj ankoraŭ eĥas en mia animo:

"Bonan sukceson! Ĝis revido!"

Poste li vojaĝis al Berno, en Svislando, en sia pilgrimado por la pionira laborado por la disvastigo de Esperanto.

Mi daŭre vivadis. Mi studadis kaj laboradis en Germanujo ĝis 1924, kiam mi vojaĝis al Brazilo. Ĉi tie mi vivadis kaj laboradis. En 1974 mi decidis ekkoni la nordorienton Brazilan. Mi ekpensis pri la vojaĝoprogramo, kiam mi ricevis de la neforgesebla samideano Braz Cosenza inviton partopreni Brazilan Seminarion de Esperanto en la urbo Fortaleza, ŝtato Cearao. Mi tuj ekiris al la sidejo de Kooperativo, de kiu li estis prezidanto.

Kiam mi eniris en la ĉambron, miaj okuloj tuj vidis grandan kaj belan portreton de Zamenhof. Mi emociiĝis, preskaŭ maltrankviliĝis. La pasinta tempo subite reaperis. Mi rigardis liajn okulojn, serenajn sed penetrantajn, kiel mi vidis en Kolonio antaŭ multaj jaroj. Ŝajnis al mi, ke li diras: "Ĉu nur nun, post tiom da tempo, vi rememoras min? Kion vi faris por Esperanto dum tioma tempo?

Post tiu renkontiĝo mi fariĝis pli aktiva esperantisto. Mi finlernis Esperanton, mi tradukis la mormonan libron "La Atesto", de Joseph Smith. Mi partoprenas en la kunvenoj de Brazila Esperanto-Ligo kaj en ĉiusemaj-

(daŭrigo sur pago 2-a)

K O M U N I K O J

bulteno eldonita de
SPIRITA ELDONA SOCIETO F. V. LORENZ
Sidejo: Rua dos Inválidos 34 ĉ. 901
20231 Rio de Janeiro (RJ) - Brazilo

Estraro:
Délio Pereira de Souza, Dir.Superintendanto
Flávio de Souza Pereira, Dir. Administranto
Romualdo de Castro Celani, Dir. Financisto
Nelson Afonso, Direktoro

Komitato:
Prezidanto:Jaddo Couto Maciel,Salvador(BA),
Affonso Borges Gallego Soares,Rio de Janeiro,
Antônio de Pádua Soares, Teresina (PI),
Ary Zamora, Porto Alegre (RS),
Benedicto Silva, São José do Rio Preto(SP),
Délio Pereira de Souza, Rio de Janeiro (RJ),
Dilermando Teixeira, Belo Horizonte (MG),
Joel Maciel Soares, Campos (RJ),
José Pauluk, Londrina (PR),
Nelson Pereira de Souza, Brasília (DF),
Walter Augusto Francini, São Paulo (SP).

Kunsidoj ĉiumarde la 10-an horon por komuna legado de "La Evangelio laŭ Spiritismo".
Disdono de minimume 3 libroj jare al anoj.
Jarkotizo: 12.50 dolaroj aŭ egalvaloro.
Speciala aniĝo por nepagipovaj samideanoj.
Konto ĉe U.E.A. - kodo: sesl-s.
Konto ĉe Banco do Brasil, Agência Centro do Rio de Janeiro - nº 405.103-3.

SPEZKONTO DE LA KVARA TRIMESTRO 1984

Enspezo:	
Antaŭa saldo	375.626,07
Kotizoj	317.400,00
Librovendado	840.577,00
Fonduso Zamenhof	440.179,00
Fonduso Ismael Gomes Braga ...	3.050.000,00
Fonduso Porto Carreiro Neto ..	98.931,00
Rento de Ŝparkonto	409.383,00
Ŝparkonto Banerj	1.000.000,00
Sumo Cr$	6.532.096,07
Elspezo:	
Sidejo - tereno	70.000,00
Ŝparkonto Banerj	1.209.383,00
Libroj aĉetitaj	217.600,00
Libroj eldonitaj	3.970.000,00
Poŝtmarkoj	486.690,00
Diversaĵoj	342.093,07
Posta saldo	236.330,00
Sumo Cr$	6.532.096,07

NI EKKONSTRUOS LA SIDEJON

La Komisiono por Konstruado, elektita de la Komitato, kunsidis unuafoje en la 4-a de Decembro, kiam ĝi estis informita pri la paŝoj faritaj de la estraro. Samtempe ĝi proponis peton al la kunsocietanoj, ke ili daŭrigu sendante mondonacojn por Fonduso Zamenhof, por la konstruaĵo.

KIAM ... (daŭrigo de paĝo 1-a)

naj fratecaj renkontiĝoj de Spirita Eldona Societo F. V. Lorenz.

Pro la proksimiĝo de la centjariĝo de Esperanto en 1987, mi konstatas la efektiviĝon de la antaŭdirajo de Zamenhof en sia pionira pilgrimado. Esperanto ne estis venkita de la du mondmilitoj, kiuj suferigis la Homaron, nek de la persekutado en kelkaj lokoj. Ĝi nun firmiĝas ĉiam pli, kiel jam rekonas UNESKO kaj UNO, kiel helplingvo internacia, kiun la homoj deziras de kelkaj jarcentoj, por ke ĉiuj sin komprenu reciproke kaj povu ami unu la alian, kiel Jesuo venis instrui.

- Tradukita el la monataj informoj al gazetaro de SEI-Serviço Espírita de Informações.

PRI "LA VOJO AL FELIĈO"

De Prof-ro Jan Ksiazek, el Piotrków Tryb., Pollando:

"Kun granda ĝojo mi bonvenigis la libron "La Vojo al Feliĉo", de H. Rohden. Ja la libroj de tiu ĉi aŭtoro estas precipe ŝatataj de mi! Mi deziras varme instigi vin, Sinjoro Délio Pereira de Souza, ke vi traduku kaj eldonu la tutan verkaron de la granda filozofo Huberto Rohden! Tio ĉi estas via grandioza verko kaj unika evento en E-movado!En mia ĉirkaŭajo pli kaj pli kreskas interesiĝo pri la libroj de Rohden kaj ni atendas pluajn viajn tradukojn!

Ekzemple, antaŭnelonge, gvidante la lektoraton de Eº, dum iu leciono mi montris al miaj gestudentoj (de Pedagogia Altlernejo) la libron "La Vojo al Feliĉo". Post la prezentado de la libro montriĝis grandega interesiĝo pri ĝi. Ĉiuj petis, ke mi havigu al ili tiun bonegan libreton. Devigita plenumi la peton de miaj gelernantoj, mi nun sendas al vi la mendon por 30 ekzempleroj de ĉi tiu libreto."

De S-ro Vilmos Bacsa, el Gyula, Hungario:

"Mi ricevis la libron "La Vojo al Feliĉo" de vi. Mi tre dankas ĝin. Min interesas la temo, kaj tial ĝojas ke mi ricevis libron. Mi legis ĝin, kaj mi ekkomprenis multajn sekretojn de la vivo. Kiel mi devas ĝuste vivi, kiu gardas min, kiel mi donas al alia feliĉon, por ke mi ne estu egoisma. Dion multaj homoj ne kredas. Ili vivas sen kredo.Ĉu ili vivas feliĉe? ili kredas tion, ke feliĉe ili vivas. Oni kuras preter unu la alian, kaj ili kvazaŭ ne vidas aliajn homojn. Vi staras apud la gemalriĉuloj, ne nur en vortoj, sed en bona agado."

Deziru nenion de via najbaro, krom la nobla kvalitoj, ornamantaj lian spiriton.

Spirito Andreo Ludoviko.

LASTAJ NOVAĴOJ

- Deziras korespondi kun brazila spiritisto F-ino Ioana Marinescu, Calea Călărasilor nr. 18 - Sector 3, 70492 Bucuresti-20, Rumanio.

- Deziras korespondi kun spiritistoj en Brazilo kelkaj samideanoj en Marakajbo, Venezuelo. Skribu al Marakajba Esperanto-Klubo, Calle 79 nº 30-72, Maracaibo-4002, Venezuela.

- La esperantistoj en Venezuelo jam povas aniĝi al la Societo pere de nia reprezentanto, S-ro David G. Valecillos V. (marakajba Esp-Klubo), pagante la jarkotizon de 12.50 usonaj dolaroj. Membroj ricevas la trimonatan bultenon "Komunikoj" kaj 4 librojn en la nuna jaro: Bhagavad-Gîtâ, Sur la Vojo al la Lumo, De Animo al Animo kaj Almanako Lorenz 1986. La reprezentanto havas malgrandan stokon de libroj de la Societo por disvendado.

- Brazila Konsilantaro de Esperanto lanĉis kampanjon por grupa lernado de Esperanto sen instruisto. Eĉ en urboj kie estas E-klubo oni povas tion fari. La grupo povas skribi al B.K.E., Caixa Postal 07-1182, 70000 Brasília (DF), por klarigi dubojn en la lernado. La estraro esperas pli multe intensigi la lernadon de Esperanto en nia lando por la festoj de la Centjariĝo de la Lingvo Internacia. Sendu al la estraro viajn sugestojn.

- Deziras korespondi pri literaturo kaj historio, precipe pri la tempo de Kristo, kiam li vivis sur la Tero, s-ro Vilmos Bacsa, p. f. 96, 5700 Gyula, Hungario.

- Deziras korespondi kun brazilaj esperantistoj pri Brazila Teozofia Societo kaj pri Zê Arigô S-ro Lester La Bron Bynum, 710 W. Georgia Av., 73005 Anadarko - Oklahoma, Usono.

- Membroj de Grupo "A Caminho da Luz", de Anápolis, Ŝtato Gojaso, deziras korespondi kun gejunuloj el tuta mondo pri Spiritismo. Skribu al S-ro Rodolfo Rommel Pfrimer, Caixa Postal 622, 77100 Anápolis (GO), Brazilo.

- En la urbo San-Paŭlo estis fondita "Nova Era" Esperanta Grupo (Rua Martin Afonso nº 78 casa 6, 03057 São Paulo (SP), Brazilo) ĉe "Centro Espírita Nova Era". La novan estraron konsistigas s-anoj José Machado, Direktoro; S-ino Nelly Furtado, Vicdirektoro; Wilson Ricardo dos Santos, Unua Sekr.; S-ino Margarida Gomes Machado, Dua Sekr.; Luiz José de Andrade, Kas.; S-ino Dalva Portella, Unua Bibl.; S-ino Vera Deodato de Toledo, Dua Bibl. La diplomiĝo de la unua klaso de Espº okazis la 2-an de Februaro.

- Almanako Lorenz kaj ĉiuj libroj eldonitaj de la Societo estas mendeblaj ĉe UEA, Brita Asocio, Ligo por Nord-Ameriko, Kanada Asocio, Japana E-Asocio, Ĉeha E-Asocio, Fondumo Eº, Internacia Kultura Servo, Carmel Malia ĉe Malto kaj Portugala E-Asocio.

MEMBRARO

La aktivaj membroj en 1984 estis 129 en 19 landoj: Brazilo 70, kaj 59 en aliaj landoj: Argentino, Ekvadoro, Kolombio, Hispanlando, Ĉeĥoslovakio, Hungario, Britujo, R. F. Germanio, Aŭstrio, Francio, Jugoslavio, Rumanio, Italio, Svedio, Irano kaj Aŭstralio.

Laŭ kategorioj: Fondintoj 22, Dumvivaj Membroj 7, Efektivaj Membroj 53, Membroj Korespondantoj 46 kaj Simpla Membro 1.

PRI "ALMANAKO LORENZ 1985"

- Pecoj el leteroj de la kunlaborintoj:

De S-ro Aureliano Alves Netto, el Caruaru - Brazilo: "Mi legis kun ĝojo la paĝojn 77/79, mian artikolon "Scienca Spiritismo", majstre tradukita Esperanten. Dankante vian valoran donacaĵon, mi volas gratuli vin kaj viajn kunhelpantojn pro la bonega prezento de ALMANAKO, ne nur laŭ ĝia grafika aspekto, same kiel laŭ la inteligenta elekto de la materio."

De S-ro Hermînio Corrêa de Miranda, el Rio de Janeiro, Brazilo: "Mi sentas min feliĉa kaj honorigita, ĉar mi estis elektita partopreni per la inkludo de "La Lasta Pruvo", kiu mi havis la okazon legi en la bela lingvo de D-ro Esperanto. Mi petas, ke vi akceptu mian gratulesprimon pro la farita laboro, en la plej bona teknika nivelo laŭ en havo kaj prezento."

DANKON

Ni dankas al la jenaj membroj la donacon:
- JAN KSIAZEK, Piotrków Tryb., Pollando: 3 ekz. Gvidlibro por Supera Ekzameno kaj 3 ekz. Baza Literatura Krestomatio.
- MIROSLAV ZAVODSKY, Zilina-Závodie, Ĉeĥoslovakio: La Dia Avarulo, Georgo Dimitrov, Kagruja Hime, Josef en Dotan, Kalevipoeg kaj Esp-isto Slovaka (revuo), Somermeze, Rakontoj de Hikoiĉi, Kranio Kantas, Bill kaj Lazuraj Okuloj kaj Fontanoj de Olomouc.
- HENRYK ROZANSKI, Bilgoraj, Pollando: Tra Dezerto kaj Praarbaro, Kvarteto de Mendelson kaj La Naŭa Kanalo.
- JOZEF PAWLAK, Kalisz, Pollando: 2 pk-oj.
- RADU PATRASCU, Bucuresti, Rumanio: 6 novaj pm-oj, serio ĉevaloj.
- HENRYK KOZACZUK, Gdansk, Pollando: Eterneco kaj 1 kolekto de bildkartoj.
- VILMOS BACSA, Gyula, Hungario: Johano la Brava.
- JAN KABALA, Piotrków Tryb., Pollando: du kovertoj kun poŝtmarkoj.

- La kotizo por enlandanoj en la dua trimestro estos Cr$ 40.000, pagebla en du partoj.

KION FARAS NIAJ GEAMIKOJ?

- Por informi kion vi faras en via spiritisma grupo, skribu al Inĝ. Alberto Flores, Rua 19-B nº 259, 27180 Volta Redonda (RJ).

- La kunfratoj en Madrid starigis en la pasinta jaro kurson de Esperanto en la sidejo de Centro de Estudios y Divulgación Espirita, Puerta del Sol 14, Madrid-3, Hispanio. La brazilaj spiritistoj povas skribi al la socieo por peti korespondanton.

- Sano kaj kunfrato Ricardo Machado Kuster, el Vila Velha (ES), instruas Esperanton en União Espírita Cristã.

- La bulteno "Steloj" de DESSEAK (Departamento de Eº de Sociedade Espírita Allan Kardec), Rua Andrade Neves 60, 90000 Porto Alegre (RS), informas ke preskaŭ 100 personoj enskribiĝis por nova Eº-kurso kiu komenciĝis en Oktobro, sub la gvidade de s-ro Cesar Dorneles Soares. En tiu grava kaj tradicia spiritisma socieo ankaŭ instruas E-on la geinstruantoj: Nydia Krieger, Zélia Coelho da Silva kaj Ernani Borges. Ĉiusabate la anoj de DESSEAK kunsidas por perfektiĝi kaj praktiki la uzadon de Eº en "Babila Rondo". Tre laŭdinda agado.

- La Sepa Brazila Esperantista Junulara Kongreso okazis en Kujaba' (21-a ĝis 27-a Janº) kun apogo de oficialaj instancoj. Oni eldonis belegan afiŝon, desegnita de s-ano Ciro Gomes de Freitas, agema artisto kaj prezidinto de la Kongresa Komitato. S-ano Amarílio Carvalho tre bone agis kiel ĝenerala sekretario kaj instruanto. 20 novaj esperantistoj ricevis diplomon. Solenaĵoj, artaj vesperoj, prelegoj, ekskursoj, filmoj ktp. Feliĉe la brazilaj gejunuloj digne festas kaj laboras en la internacia jaro de la junularo. Gratulon al la organizintoj.

- "Informilo", bulteno de la E-Fako de Spiritisma Unuiĝo de Stato Minas Gerais, Rua Guarani 315, 30000 Belo Horizonte (MG), informis, ke 42 novaj esperantistoj finis kurson de Eº gvidatan de s-ano Alberto Lunardi Chieiri. Tre bela rikolto!

- S-ano Ayesha Spitzer instruas E-on ĉe Centro Espírita Casa do Caminho, Rua Estado de Israel 59, V. Clementino, 04022 São Paulo (SP); kaj s-ano Manoel Nery instruas nian lingvon ĉe Societo de Spiritismaj Studoj 3 de Outubro, Rua Clélia 663, Lapa, 05042 São Paulo (SP). Ili semas kaj semas konstante!

- Nia sindona s-ano G. A. Silva Velho, Caixa Postal 101, 12280 Caçapava (SP), kolektas, redaktas, skribas, faras kopiojn kaj dissendas cirkulerojn kun informoj pri la E-movado. Silva Velho ankaŭ preparis 40 afiŝojn pri la movado, kiuj formas porteblan ekspozicion, facile munteblan en iu ajn loko. Pro lia valorega agado, s-ano Silva Velho meritas niajn dankojn kaj laŭdojn, li estas vera "motoro", kiu antaŭen puŝas Esperanton.

LIBROJ EL EKSTERLANDO POR BRAZILANOJ

	Cr$
APONTAMENTOS DE ESPERANTO	10.000
BAZA LITERATURA KRESTOMATIO	14.000
EKSTERTERANOJ FORKONDUKIS NIN	25.000
FENOMENO SVISLANDO (LA) (nur 1 ekz.)	13.000
FILOJ DE L'ŜTONKORA HOMO, bildrakonto	5.800
GRANDA GALERIO ZAMENHOFA - vol.I	117.000
HISTORIO DE LONDONA KLUBO	15.000
LINGVA ESENCO DE ESPERANTO (1 ekz.).	32.500
KONSULTLIBRO PRI E-BIBLIOTEKOJ	5.850
KVAROPO (poemoj)	23.000
KVARTETO DE MENDELSOHN	6.500
KVINDEK JAROJ DE Eº EN OOMOTO	7.800
MASTRO DE KÕRBOJA (LA)	4.800
MEDALIONOJ, Zofia Nalkowska	3.800
MIA VERDA BREVIERO, J. Forge (1 ekz.)	17.500
NOVA TESTAMENTO (LA), Biblia Soc. ..	16.900
PAPEROJ DE D-RO BAMLJAK (LA)	4.200
PANORAMO DE ESPERANTA LITERATURO ...	18.200
PRI INTERNACIA LINGVO, I.Dratwer ...	34.000
PROVERBARO, Zamenhof	5.800
SANKTA BIBLIO (LA), Biblia Soc.	25.000
SLOVAKA ANTOLOGIO	26.000
SOMERMEZE, Paul Krusberg	5.300
ŜERCOJ, RAKONTOJ (1 ekz.)	3.800
VERKOJ DE HEIRICH HEINE (1 ekz.) ...	23.000
VESPERA GRUO (nur 1 ekz.)	15.000

- Nova eldono de La Biblio je malpli alta prezo. Rabato por membroj.

- La grava spiritisma revuo "Reformador", de Julio 1984, eldonita de FEB, prezentis sur la kovrilo koloran portreton de D-ro Zamenhof (kiel propagando de la libro "Doktoro Esperanto", de Walter Francini) kaj interne estas kelkaj artikoloj pri Esperantaj aferoj, verkitaj de niaj kunfratoj Alberto Flores, Celso Martins kaj Affonso Soares. La apogo de FEB al Eº estas vere laŭdinda kaj imitinda. Nepre legu la revuon "Reformador", ĉar ĝi ĉiam enhavas ion interesan pri Esperanto -Spiritismo-Evangelio.

- S-ano Élio Lopes de Oliveira fervore instruas E-on ĉe "Aliança Espírita de Além Paraíba", Rua Manoel Souza 139, Vila Laroca, 36660 Além Paraíba (MG). Ni varme gratulas s-anon Élio L. Oliveira.

- "Hileo" estas la nomo de kolektiva bulteno de Amazona E-Asocio (Manaus-AM), Amapá E-Klubo (Macapá-AP), Esperantista Asocio de Maranhão (São Luís-MA), Fundação Matogrossense de Eº e Lingüística (Cuiabá-MT), Eº-Societo de Santarém (Santarém-PA), Okcidenta E-Asocio (Rio Branco-AC), Eº-Asocio de Roraima (Boa Vista-RR). Bona ekzemplo de kunlaborado!

- Okazos en Braziljo de la 24a ĝis la 31a de Marto la Dua Spiritisma Esperantista Semajno, aranĝita de "Federação Espírita do Distrito Federal". La malfermo okazos en la nova sidejo de "Federação Espírita Brasileira" sub la gvido de D-ro Benedicto Silva, nia eminenta samideano, kaj la fermo en F.E.D.F.